横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

# EKSPOZICIO PRI INTERNACIA KUNFLUO + ESPERANTAJ LIBROJ

*de la 1-a ĝis la 3-a de septembro, ĉe la teretaĝa ekspoziciejo en Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa).

Ni luis ekspoziejon en la konstruaĵo, en kies supra etaĝo ni regule kunsidas, kaj havis ekspozicion pri Esperanto kaj de Esperantaj libroj. Ĉar ĝi okazis nur en labortagoj, ne multaj vizitis — laŭtakse cent civitanoj. Ni havis multajn okazojn ekspozicii en unu tendo, sed tia vasto estis la unua sperto. Fakte ni utiligis 30 metrojn da muro por fotoj kaj klarigaj paneloj, kaj 15 metrojn da vicigitaj tabloj por disponigi kelkdekojn da esperantaj libroj.

Ekspoziciitaj paneloj estis jenaj, laŭvice de la enirejo al la profundo de la ejo:

(grupo 1) pri Esperanto, laŭ karikaturaĵo de Tony Laszlo (*)

(grupo 2) utiligo de Esperanto en Jokohama Esperanto-Rondo, fotoj kun klarigo, laŭ aranĝo de Sibayama Zyun'iti

(grupo 3) pri la lingvaj flankoj de Esperanto (*)

(grupo 4) internaciaj renkontoj, fotoj ĉefe el la 99a UK kaj ties Antaŭkongreso, de Doi Hirokaz

(grupo 5) japanaj eminentuloj, kiuj estis esperantistoj, portreto kaj klarigo (*)

(*): la paneloj estis pruntitaj de la Biblioteka Kleriga Centro en la urbo Obama, gubernio Hukui, kie okazis ekspozicio pri Esperantaj libroj. La informo en la panelo estis elektronike liverita de la arkivo de Japana Esperanto-Instituto. Ni dankas ilin pro la materialo.

Ekspoziciitaj libroj estas ĉefe mondliteraturaj tradukoj en Esperanton, foje kun ties japanlingva tradukaĵo paralele metita. La librojn plejmulte disponigis Doi Hirokaz, kun helpo de kelkaj aliaj. Ili estis aranĝitaj de Japanio kaj aliaj kontinentaj mondpartoj, kun simpla klariga slipo.



■ Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO,Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: http://www.hamarondo.org
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

# PREZENTO DE SOMERAJ SPERTOJ
# + "EK AL LA FONDO DE NPO"

*la 6-a de septembro, 13h00-17h00, en Tikyuu-Simin-Kanagawa-Plaza
Kiel kutime en la somerfino, niaj rondanoj parolis pri sia sperto en Esperanto, ofte kun bildoj projekciitaj. Jenaj epizodoj estis priparolitaj ĝis 15h30.

#Ooguro Yukiko: Geedziĝa ceremonio en Hispanio (... tie okazis edziniĝo de katalonino en Urbo Ĝirono, kiu estas la konatino de la filino de s-ino Ooguro).

#Nanba Fumiharu: Vojaĝo per la luksa ŝipo Asuka II (... krozado de Koobe al Insulo Titizima, kaj reveno)

#Suzuki Keiichiro: La 99a Universala Kongreso kaj poste al Peruo (... post la UK li vizitis Peruon, kie vivas lia frato)

#Negisi Satiko: Vojaĝo longe revata (... vizito al UK-lando, ankaŭ al montaro proksima al Ĉilio)

#Koyama Takesi: 24 Universalaj Kongresoj (... Ekde la 76a UK en Bergeno, ĉiujare li vizitis UK-n, ĝis la 99a en Bonaero ĉi-jare)

#Doi Tieko kaj Doi Hirokaz: Elreliĝo de la Trajno al la Nuboj, la 99a Universala Kongreso kaj Bonaero (En la Antaŭkongreso de la UK, okazis fervoja akcidento, sen vundiĝo, sed malsukceso atingi celatan lokon)

De 15h30, ni havis kunsidon, ke nia nuna rondo fariĝu jura persono, laŭ la japana sistemo de Ne-Profitocela Organizaĵo. Ni konfirmis nian intencon kaj la provizoran statuton, kun kiu s-ro Doi Hirokaz, la ŝarĝito pri tiu ĉi afero, negocos kun la koncernaj oficistoj de la urbo Jokohamo por jura status-akiro en aprilo 2015.

## TIEL OKAZIS

## PAROL-KURSO DE WAJIK

*la 26-a de julio, 15h00-17h00, ĉe la regula kunvenejo
Tiam ĉeestis entute 9, inkluzive de Wajik kaj 2 finintoj de la rudimenta kurso. Tie oni ekzercis sin en konversaciado, jen legante ĉapitron el libro, jen tute dialoge.



# NIAJ PLANOJ

## LA 101-A JAPANA ESPERANTO KONGRESO EN HUKUI




*la 11-a, 12-a kaj 13-a de oktobro, en Urbo Obama en Gubernio Hukui
El inter abundo da programeroj, nia rondo havos budon por montri niajn agadojn kaj vendi librojn eldonitajn de ni.

## JOKOHAMA AŬTUNA INTERNACIA FESTO 2014

*la 18-a kaj la 19-a de oktobro, en la parko Zoo-no-hana
Nia rondo prezentos Esperanton en tendo, inter multaj tendoj de grupoj por internacia kunlaboro. Pri la parko vidu alian artikolon.(1) fotojn pri niaj agadoj, i.a. internaciaj, (2) libroj en Esperanto, kaj (3) kiel kutime pri Esperanto.

## Niaj Klasoj kaj Kursoj

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.
*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Meza klaso gvidata de Doi Ĉieko; de junio oni lernas per kroata rakonto “Mirindaj Aventuroj de Metilernanto Hlapiĉ” . / (2) Klaso por legado de “Vivo de Lanti” / (3) Jokohama Salono / (4) Rudimenta kurso, gvidata de Fuse Kentarou, nun kun 5 lernantoj.
*Regulaj Klasoj en merkredo: (1) Oni legas la verkon de Edmond Privat, “Karlo”. / (2) Daŭriga kurso, per la posta parto de “Hanako lernas Esperanton”.

# ESEOJ PRI JOKOHAMO

## Parko “Zoo-no-hana” aŭ Parko Elefanto-Rostra

**Sibayama Zyun’iti**



(foto de Aimaimyi: CC BY-SA / Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0, el Wikipedia)

En la lastaj kelkaj jaroj, Jokohama Esperanto-Rondo ekspozicias pri Esperanto en la kadro de la Jokohama Aŭtuna Internacia Festo, en placo nomata Parko “Zoo-no-hana, nome Parko Elefanto-Rostra (aŭ Elefanto-Naza). Kial la parko havas tian ĉi nomon?

Ĝi situas ĉe maro, apud la nuna ĉefkajo de la Haveno Jokohamo, sed ĝi estis la fondoloko de la Haveno Jokohamo en 1859, kiam ĝi estis malfermita kiel moderna haveno al eksteraj landoj, rezulte de la limigita malfermo de la Japanio al la mondo. Ĝis tiam, Japanio estis lando fermita al eksterlanda komerco kaj vojaĝado.

Por ke ŝipoj ankru, oni faris du kajojn,oriente kaj okcidente de la haveno, kaj la orienta kajo havis iom da kurbo internen al la ŝip-ankra akvospaco. Tial la orienta kajo estis alinomita “Elefanta Rostro”.

Sed en 1896, la Granda Kajo, kiu ankoraŭ hodiaŭ funkcias, estis konstruita pli oriente ol la kajo Elefanto-Rostra, kaj la ĝistiama ŝip-ankrejo estis apenaŭ uzita plu. En 1923, la Granda Tertremo atakis la havenon, kaj oni rekonstruis la kajon tamen jam sen kurbo.

En 2009, okaze de la 150-a datreveno de la Jokohama Haveno, oni rekonstruis la kajon kun kurbo, kaj samtempe instalis parkon al la lando. Hodiaŭ ĝi funkcias kiel unu el la promenejoj de la urbanoj kaj turistoj al Jokohamo. Eventoj kiel Jokohama Aŭtuna Internacia Festo okazas ĉi tie, kie ankaŭ nia rondo prezentas Esperanton en tendo.



# Teatreto "Cross Street"

**Mizro Iwaya**

Meze en la urbo Jokohamo, en la kvartalo Isezaki, troviĝas teatreto nomata "Cross Street". Ĝia kapacito estas ĉirkaŭ 50 seĝoj. Tre malgranda, ĝi aspektas pli kunsidejo ol teatreto. La fondiĝo estis en 2010 fare de la loka komercistaro.

Mi konatiĝis kun Cross Street en 2011 kiam okazis la festivalo "Jazz Promenade" en Jokohamo. Mi iris spekti la muzikan plenumon ĉirkaŭ Sakuragi-ĉo kaj Isezaki-ĉo. La plenumitaj muzikoj estis tre bonaj; elstaraj en originaleco kaj matureco. Ili prezentis muzikon en diversaj grupoj laŭlonge de la strato ĉ. du kilometrojn longa. En Isezakiĉo la koncertejo montris sin en la aŭto-imuna strato nomata Isezakiĉo-Mall. Ĉe la suda ekstremo de la strato staras malgranda domo nomata Cross Street. Laŭ la natura fluo de migrado, mi spektis la muzikan plenumon tie. Post la muzika prezentado mi trovis la monatan planon de la teatreto. Diversaj muzikaj grupoj kaj soluloj prezentas muzikon tie en ĉiu semajnfino en minimuma prezo. Granda trovaĵo!

De tiam mi frekventis ĝin. Bedaŭrinda afero estas ke ĝi komenciĝas je la dekunua kaj duono kaj finiĝas je la kvina kaj duono en sabato. La kunsido de nia Hama Rondo komenciĝas je la tria. Do mi povas resti en la koncertejo nur dum du prezentaĵoj. (Unu prezentaĵo daŭras 40 minutojn.) La muzikistoj estas ĉefe novicaj profesiuloj kiuj ne akiris popularecon en la publiko, kaj la plenuma garantiaĵo supozeble estas minimuma aŭ nula. Ili klopodas konigi sin al laŭeble multe da muzikamantoj, aŭ eble ili kontentiĝas nur per publika prezentado kvazaŭ amatoroj. Tipa ekzemplo de la unuaj estas t.n. idoloj, interalie idolaj knabinoj. Oni povas tuj distingi ilin de aliaj muzikistoj ĉar la spektantoj estas plejparte junuloj tiam. Do oni povas diri ke ĝi estas malgranda AKB.

Mi mem ludas muzikon. Samtempe mi ŝatas aŭdi muzikon. Do mi kredas ke mi daŭre vidos la prezentaĵon en Cross Street.

